februaro 1964

NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio "La Estonto Estas Nia"

29-a jaro, n-ro 2-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O. Jara abono por ne-membroj: gld. 3,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

GRAVA NOVA ELDONO:

TRADUKOJ EL LA FRISA LINGVO.

Traduki tekston de unu lingvo en alian estas malfacila tasko, egale ĉu oni tradukas el sia propra en Esperanton aŭ inverse aŭ el sia propra nacia lingvo en alian nacian. Ankoraŭ multe pli malfacile estas, se temas pri tradukado de arta prozo aŭ poezio.

Tiukaze tradukado estas arto, kiu postulas rekreon de la originalo en alia, same kontentiga formo.

Ofte la tradukita teksto ne tute aŭ tute ne kontentigas la tradukint(in)on aŭ la legant(in)on, kiu komprenas ambaŭ lingvojn.

Plurfoje tio dependas ankaŭ de la gusto. Ne ĉiuj ŝatas ĉiam la samajn formojn eĉ se ili ne estas eraroj. Tradukado postulas ne nur ĝustecon, fidelecon, sed ankaŭ belecon, ĉarmon.

Sed ĝuste tial tradukado estas interesa, plezuriga laboro, kiu logas multajn, precipe esperantistojn.

Per traduko en Esperanton oni ja povas atingi plurajn tre diversajn popolojn samtempe. Do esperantistoj povas per tradukado plenumi gravan mision. Tial tiu tasko allogas multajn.

La frisaj verkistoj Douwe Tamminga kaj d-ro Anne Wadman tradukis 20 frisajn rakontojn en la nederlandan lingvon kaj aperigis tiun rakontaron en 1960 ĉe la eldonejo Nijgh & Van Ditmar, Hago-Roterdamo, sub la titolo

„FRIESE VERHALEN IN HET NEDERLANDS".

Estis laŭ mi bona ideo diskonigi parton de la frisa literaturo de la 20-a jarcento al la ne-frisaj nederlandanoj, kiuj ĝenerale konas Frislandon nur kiel regionon de la velsporto, glitkurado, brutbredado kaj terpomeksporto. Tiel ili povis ekscii ankaŭ pri ĝia literaturo, kiu meritas tradukon en la nederlandan „regnan lingvon".

Jam antaŭ la apero de la nomita rakontaro mi pensis pri ĝia tradukiĝo en Esperanton por informi la tutmondan esperantistaron pri la malgranda Frislando kaj ĝia literaturo en la nuna jarcento. Jen bona okazo doni unuajn pruvon kaj provon de ĝia nuntempa literaturo.

Por plenumi la afablan peton de la redaktoro de „Nederlanda Esperantisto" foje liveri Esperanto-tradukon de frisa rakonto mi elektis el tiu rakontaro du rakontojn, kies originalajn frisajn tekstojn mi havis ĉe-mane.

Post tuja afabla permeso de la geverkintoj, s-ro Freark Dam kaj f-ino Boukje Fokkema, mi tradukis iliajn rakontojn en esperanton.

La esperanto-traduko de la rankonto „La Memorigilo" de Freark Dam aperis en „Nederlanda Esperantisto", n-ro 6-a de jarkolekto 1960, kaj estis voĉlegata en la vendreda „Literatura Rubriko" de la Esperanto-programo de la Pola Radio.

Super la traduko en „Nederlanda Esperantisto" mi sugestis:

„Estus dezirinde aperigi la tutan kolekton en Esperanto-traduko. Eble tio okazos. Kiu scias? Jen almenaŭ la komenco".

Tiu sugesto vekis entuziasmon ĉe la estraro kaj kelkaj geanoj de „Frisa Esperantista Rondo" (la sekcio Leeuwarden de L.E.E.N.) kaj fris-devena esperantisto en Francujo (s-ro Sipke Stuit en Arras). Pro la vekita entuziasmo mi ricevis tiom da kunlaboro, ke mi mem bezonis traduki nur 4 rakontojn; 16 aliajn rakontojn, inter kiuj estas 2 aliaj ol tiuj en la nederlandlingva traduko de la rakontaro, tradukis la gesamideanoj, kies nomojn mi danke mencias ĉi-sube.

Mi nun jam ĝoje povas sciigi, ke baldaŭ aperos la rakontaro en esperanto sub la titolo:

„FRISAJ RAKONTOJ EN ESPERANTO"

Eldonos: „Frisa Esperantista Rondo", Ljouwert/Leeuwarden, sub aŭspicioj de „Universala Esperanto-Asocio", Rotterdam, kaj „Fryske Akademy", Ljouwert/Leeuwarden. Kovrildesegno de la konata frisa ornamartistino f-ino Anne Porte. Presejo: DRUKKERIJ LAVERMAN N.V., Drachten. La prezo estos 5,50 gld. (22 steloj).

Oni havu ankoraŭ iom da pacienco, ĉar la traduko estas ankoraŭ en la presejo, sed ni tiom ĝojas pro la eblo povi aperigi ĝin, ke ni jam nun volas informi vin pri la enhavo:

ENKONDUKO de la finredaktoro (Sibe Sipke de Jong Dsn);

1. „La Piano" - Reinder Brolsma (Tsjerk Boersma);
2. „Janny kaj la Printempo" - B. Tuinstra (Wyp Steffering);
3. „Dimanĉa Vojaĝo" - Ulbe van Houten (Sibe Sipke de Jong Dsn);
4. „Kiu ridas plej laste" - S. Kloosterman (Tine Brinkman);
5. „La dua Morto" - Nyckle J. Haisma (Sipke Stuit);
6. „La Maro postulas ĉiom" - Hein Faber (S. Stuit);
7. „La Limando-kaptistoj" - Sjoerd v. d. Schaaf (S. Stuit);
8. „Moab estas mia Lavopelvo - G. Mulder (W. Veldman);
9. „Memorigilo" - Freark Dam (S. S. de Jong Dsn);
10. „Epizodo" - Marten Sikkema (S. S. de Jong Dsn);
11. „To-morrow morning" - Anne Wadman (S. Stuit);
12. „La Triangulo" - Geart Jonkman (J. Tjepkema);
13. „Duobla Loĝejo" - Boukje Fokkema (S. S. de Jong Dsn);
14. „La Japanaj Anasoj" - Jan Wybinga (S. Stuit);
15. „Pyt" - Ype Poortinga (S. Stuit);
16. „La Ŝtelmaniulo" - Paulus Akkerman (S. Stuit);
17. „Noktvagonaro al Chicago" - Tiny Mulder (Tsjerk Boersma);
18. „La Gastamo" - Sjoerd Leiker (S. Stuit);
19. „La Renesanco" - Jo Smit (S. Stuit);
20. „Edu, tiu knabo" - Ria Postma-Stolk (S. Stuit).

La nomoj inter krampoj estas tiuj de la getradukintoj.

La 9-a kaj 13-a rakontoj aperis en „Nederlanda Esperantisto". Pola Radio disaŭdigis la 9-an.

La aliaj tradukoj ankoraŭ ne aperis.

Espereble baldaŭ povos aperi en la Esperanto-gazetaro anonco pri la eldono de la tuta rakontaro.

SIBE SIPKE DE JONG DSN,
finredaktoro de la kolekto
„Frisaj Rakontoj en Esperanto".

TRA LA LIBRARO.

Sekcio Arnhem.

Sekr.: Pontanuslaan 7.

Je vendredo, la 13-an de decembro, ni festis sub aŭspicioj de la Arnhema Esperanto-Kunlaborkomitato nian Zamenhofvesperon en la bela salono de „Hotel Twente".

S-ro Faulhaber el Amsterdam prelegis pri „La idealo de Zamenhof en la nuna tempo". S-ino A. Kooy-van Holst el Rotterdam deklamis antaŭ la paŭzo „Memuaro" de Zamenhof. Post la paŭzo s-ino Kooy rakontis „Malnova Legendo", amuzan baladon de Tollens.

S-ino J. Koopmans-Schotanus el Didam, akompanate de f-ino Putto, kantis diversajn kantojn.

Entute ĝuinda vespero.

„Frisa Esperantista Rondo" (sekcio Leeuwarden).

Sekretariejo (portempa): Curaçaostr. 16.

F.E.R. festis jam la 14-an de dec. la Zamenhoftagon kaj librotagon en kunlaboro kun sekcio Groningen en Leeuwarden. La junulargrupo de sekcio Groningen prezentis teatraĵeton en Esperanto. Poste sekvis du interesaj filmoj: unu pri la kunmeto de filmomaterialo kun parolata Esperanto-teksto kaj la alia estis fabelfilmo, ĉe kiu sonis Esperanto-teksto laŭ la traduko de Zamenhof mem, kiu ja tradukis 4 volumojn da „Fabeloj de Andersen".

Vespere estis kunveno en la Publika Legejo en Leeuwarden, kie paroladis s-ino E. Burgler-Jezsó el Amsterdam, anino de la Ekzamena Komitato kaj redaktorino de la monata gazeto „La Praktiko", en la nederlanda lingvo por komplezi al la ne-esperantistaj ĉeestantoj.

Ŝi bone atentigis, ke en Esperanto aperis ĉiaj literaturaĵoj: romanoj, noveloj, krimrakontoj, eseoj, poemoj, parodioj, teatraĵoj, infanlibroj kaj fakliteraturo. Grava estas ankaŭ la tradukita literaturo, per kiu Esperanto kiel ponta lingvo disvastigas la nacian literaturon de diversaj, ankaŭ malgrandaj, nacioj, ekz. la kataluna, finnlanda, nederlanda ktp. (ĉi-rilate la prezidantino de F.E.R. atentigis pri la apero de kolekto de „Frisaj Rakontoj en Esperanto", kiun F.E.R. mem eldonos sub aŭspicioj de „Fryske Akademy" kaj U.E.A. Vidu la ĉefartikolon de ĉi tiu n-ro).

La prelego de s-ino Burgler kaj la deklamado de diversaj originalaj kaj tradukitaj poemoj fare de f-ino W. Steffering, la prez. de F.E.R., tre plaĉis al la ĉeestantoj.

Fine de la kunveno oni ankoraŭ memoris la 15-jaran ekzistadon de la „Ĝenerala Deklaro de la Rajtoj de la Homo". Okaze de ĉi tiu kunveno estis kelkajn tagojn libro-ekspozicio de Esperanto-verkoj en la Publika Legejo, kiu mem havas tutan kolekton.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Joh. de Wittstraat 103.

La Zamenhofan tagon ni festis kune kun la frisaj samideanoj en Leeuwarden en agrabla sfero.

La junulargrupo el Groningen prezentis la teatraĵon: „Aladin kaj la mirakla lampo", tradukita de f-ino Hovinga kaj gvidata de f-ino Meywes. La frisa grupo montris 2 filmojn, unu pri la fabrikado de la Gevaertfilmoj kun esperanto-teksto; la alia estis angla filmo pri la fabelo de „la stana soldato" de H. C. Andersen, kiun ankaŭ d-ro Zamenhof tradukis. Sinjorino De Vries el Leeuwarden resumis tiun fabelon en esperanton.

Vespere en la publika legejo s-ino Burgler-Jezsó tre interese prelegis pri la esperanto-literaturo kaj f-ino W. Steffering, la prezidantino de la frisa esperantoklubo, bonege deklamis kelkajn esperanto-poemojn.

La monkolektado inter la anoj por la propaganda kaso bonege sukcesis. Per tiu mono ni volas fari propagandon post la U.E.A.-kongreso en Hago, por varbi novajn gekursanojn. Dum iu klubkunveno ni jam havis forumon, dum kiu la anoj havis la okazon proponi ion rilate al la farota propagando.

La prezidanto de la Geografia Asocio, s-ro T. Sekelj el Beograd, petis nian sekcion, ĉu ni bonvolu organizi la tiel nomatan „Geografian Semajnon", en kunlaboro kun li. Ni konsentis kaj elektis komitaton, kiu prizorgos tiun aferon. La komitato estas jam fervore laboranta.

ZAMENHOFA REMEMORIGO EN HAGO.

Sabaton, la 14-an de decembro 1963, H.E.K.K. aranĝis por la hagaj Esperantistoj agrablan posttagmezon por rememorigi kune du gravajn faktojn: la Zamenhofan tagon kaj la 15-an datrevenon de la Akcepto de la Homaj Rajtoj.

La granda salono, sencoriĉe ornamita per diverslandaj flagetoj kaj per la belega fotoserio de Unesko pri la Homaj Rajtoj, baldaŭ plenpleniĝis; la lastaj enirantoj devis mem kunpreni seĝon el alia salono!

Post la bonvenigaj vortoj de s-ro Vernooy, s-ro Kervers, prezidanto de la haga sekcio de L.E.E.N., parolis pri la signifo de la Homaj Rajtoj por ĉiuj loĝantoj de nia terglobo sen iu ajn diferenco rilate al ilia politiko, religio aŭ haŭtkoloro.

Liaj klaraj, simplaj vortoj vekis grandan entuziasmon, ankaŭ ĉe multaj komencantoj en la salono, kiuj nun spertis, ke ili povas ne nur kompreni, sed eĉ ĝui veran prelegon!

S-ino v. d. Kooy-v. Holst parkere deklamis la prelegon de d-ro Zamenhof al la Kongreso de la Rasoj en Londono. Ĉu

vere tiu aktuala prelego estis elparolata jam en 1911? Estis kvazaŭ ĝi pritraktus niajn freŝdatajn problemojn pri la rasa diskriminacio! Kiel klare ni aŭdis la emocion de la Majstro per la voĉo de s-ino v. d. Kooy. Dum la paŭzo preskaŭ ĉiuj amasiĝis ĉirkaŭ la bela librostando de la A.P.-librejo, kie ni kun ĝojo renkontis s-ron Van Dalen, kiu pro la Zamenhofa tago venis el Amsterdamo. Zamenhofa tago ja signifas ankaŭ: Esperanto-librotago! Multajn mi vidis kun libropaketo en la manoj!
Post la paŭzo s-ro Schippers, prezidanto de L.E.E.N., brile prelegis pri la „Evoluo kaj Eblecoj de Esperanto", montrante i.a. la malfacilaĵojn de la traduko el diversaj naciaj lingvoj, kiuj diras la samon per malsamaj esprimoj. Ofte mi aŭdis la deziron, ke la prelego estu presita en iu Esperanto-gazeto, por ke oni trankvile povu relegi ĝin.
Por fini ĉi tiun interesplenan posttagmezon, s-ino v. d. Kooy deklamis ankoraŭ poemon en la kristnaska sfero.
Vere, kvankam s-ro Schippers aludis al la fakto, ke tro milda kritiko estas senvalora, mi estas certa, ke mi parolas en la nomo de ĉiuj ĉeestantoj, kiam mi elkore dankas ĉiujn prelegintojn, kiuj donis al ni tiel altnivelan memortagon.
Kiel kortuŝanta estas la penso, ke en la tuta mondo Esperantistoj rememoris kune kaj d-ron Zamenhof, kaj la Homajn Rajtojn, kiuj estas la plenumo de liaj idealo kaj sopiro.

E. O.

Sekcio Zaandam.
Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Lundvesperon, la 10-an de februaro, okazos nia jarkunveno en la malsupra salono de „De Harmonie". Enirejo Rustenburg 71 C, Zaandam. La tagordo i.a. enhavas informojn pri la ĉi-jara UEA-kongreso en Hago kaj la ZEK-kunvenoj. Espereble neniu membro forrestos.

La estraro.

Manuskriptojn por iu numero de N.E. ni akceptas ĝis la 10-a de la antaŭa monato. Post tiu dato ni ne plu povas akcepti ion.

La Redaktoro.

Peto de Brita Grupo de Esperantistaj Instruistoj.

La brita grupo de Esperantistaj instruistoj intencas organizi karavanon de britaj infanoj kaj junuloj al la Infano-Kongreseto kaj T.E.J.O.-Konferenco, sub gvido de i.a. s-ro Ph. Buttinger.
Ili nun petas la nederlandajn Esperantistojn gastigi la britajn infanojn, dum la junuloj vizitas la TEJO-kongreson, kaj gastigi la junulojn, dum la infanoj partoprenas la infanan kongreseton. Tiu gastigo povas esti kontraŭ pago aŭ interŝanĝo, do ke nederlandaj infanoj aŭ junuloj estos iam gastoj en Britujo.
Kiu ŝatas la ideon kaj povos helpi la britajn organizantojn, skribu al:

s-ro Ph. Buttinger,
3 Dafforne Road,
London, S.W. 17, Britujo.

ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE.

Kasstaat 1963

	Ontvangsten	Uitgaven
Saldo 1962	f 398,10	
Bijdragen organisaties		
Onkosten jaarver.		f 155,66
Exam. Amersf. 4/6'62		
Ontvangsten f 442,—		
Uitgegeven f 136,65		
	f 305,35	f 305,35
Adm.kosten		f 56,84
Drukw. en papier		f 52,90
Saldo 1963		f 498,05 *)
	f 763,45	f 763,45

* Hierbij is inbegrepen een bedrag ad f 250,— voor aanschaffing van een opbergkast (volgens besluit jaarvergadering 28-12-'63).

Kiuj deziras gastloĝi ĉe fidinda Esperantisto en VRACA (Bulgario) kontraŭ reciproka loĝado de li dum la Haga kongreso?

Inf. ĉe fam. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem.

Tel. 0 8300 - 2 12 56.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ

49-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Den Haag, 1—8 aŭgusto 1964.

Sub la Alta Protektado de Ŝia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Poŝtĉekkonto: 378964. Tel.: 3288.

OFICIALA KOMUNIKO.

N-ro 5-a.
Rotterdam, la 12-an de decembro 1963.

Honora Komitato. Akceptis eniri en la Honoran Komitaton de la 49-a U.K. Mag. Th. H. Bot, Ministro pri Instruado, Arto kaj Scienco; D-ro W. Drees, Honora Ministro; Barono F. X. van der Straten Waillet, Dojeno de la Ambasadoroj en Nederlando; Mag. J. A. Jonkman, Prezidanto de la Unua Ĉambro de la Paramento; Mag. F. J. F. M. van Thiel, Prezidanto de la Dua Ĉambro de la Parlamento; Mag. J. Klaasesz, Prefekto de la Provinco de Sud-Hollando; Mag. H. A. M. T. Kolfschoten, Urbestro de Den Haag; Mag. G. E. van Walsum, Urbestro de Rotterdam; Prof. D-ro C. J. Gorter, Prezidanto de la Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj; Prof. D-ro De Vries, Rektoro de la Instituto por Sociaj Studoj.

Petoj por helpo. La membroj de la Loka Kongresa Komitato kaj multaj aliaj esperantistoj, kies nomoj troviĝas en la Kongresa Libro de la 48-a U.K., daŭre ricevas petojn de nekonataj personoj, por ke oni pagu la aliĝkotizon al la 49-a U.K. kaj eĉ la restad- kaj vojaĝkostojn. Ni bone komprenas la situacion de la petantoj kaj bedaŭras pro tio, sed ni devas atentigi, ke oni ne rajtas uzi la nomliston en la Kongresa Libro por sendi petojn aŭ iamaniere ĝeni personojn. La ricevantoj de tiaj leteroj estas liberaj ne doni respondon.
Samtempe ni atentigas, ke invitleteroj por la 49-a U.K. estas senditaj *nur* al pagintoj de la kongreskotizo.

Fakaj Kunvenoj. Anoncis fakan kunvenon dum la 49-a U.K.: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista; Universala Ligo; Internacia Geografa Asocio; Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj; Sendependa Ordeno de Odd-Fellow; Veterana Esperantista Klubo; Rotaria Klubo; Universala Medicina Esperanto-Asocio; Esperanta Ŝak-Ligo; Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio; Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistaj; Studenta Tutmonda Esperantista Ligo; Tutmonda Esperantista Junulara Organizo; Martinus-Instituto; Internacia Ligo de Esperantistaj Filmistoj; Internacia Asocio de Esperantistaj Eldonistoj.

Ĝis 11/12/1963 aliĝis entute 824 personoj el 28 landoj.

Internacia Junulara Esperanto-Feriosemajno ĉe Balaton-Lago, Hungarujo, de la 9-a ĝis la 20-a de julio 1964-a.

Prezoj de la 12-taga restado:

a. en 2-persona tendo kun po tri manĝoj tage 23,50 Us. Dol.
b. en 4-persona tendo kun po tri manĝoj tage 23,— Us. Dol.
c. en turista loĝejo kun po tri manĝoj tage 19,— Us. Dol.

Interesiĝintoj ricevos post anticipa sinanonco detalajn informojn kaj aliĝfolion. Adreso: Hungara Esperanto-Asocio, BUDAPEST V, Petöfi S.u. 17, Hungarujo.

INTERNACIA NATURISTA ORGANIZO ESPERANTISTA.

Internaciaj kunvenoj 1964.

I-a Komuniko Provizora Programo:
I) Ĝenerala kunveno de INOE kaj partopreno en la Internacia Kongreso de INF/FNI en Heliomonde, St. Chéron (40 km. de PARIZO) de la II-a ĝis la 14-a de julio. 2) La ferioj de la Naturistoj-Esperantistoj: Unu semajno, de la 19-a ĝis la 26-a de julio, en unu al la plej belaj internaciaj restadejoj de Francio; sportkonkursoj, prelegoj, internacia kurso por komencantoj, distra vespero, libera tempo por babili, bani, k.t.p. 3) Se estas petantoj, komuna vizito al Parizo, de la 15-a ĝis la 18-a de julio. *Loĝeblecoj:* Nepre garantiitaj por tiuj, kiuj havas propran tendon. La aliaj bonvolu skribi al A. BERTIN, 6 Rue des Champsblancs, VERRES (S. et O.) Francio. La afero estos studata laŭ la nombro da petantoj.

LABORPLANO de la Nederlanda Esperanto-Asocio „L.E.E.N".

CELO:

En ĉi tiu laborplano kristaliĝas la stato de la disvastigo de Esperanto en Nederlando kaj la eventualaj eblecoj, laŭ kiuj la Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN povas grandigi tiun disvastigon de Esperanto sur la interna kaj ekstera terenoj. Per ĉi tio ni denove emfazas la neceson proponi la Internacian Lingvon kiel solan solvon de la nuntempa lingvo-problemo, kiu nun evidentiĝas en la kontakto inter nia lando kaj la aliaj landoj.

INTERNAJ TASKOJ:

A Organiza plifortigo:

1. altigi la nombron de niaj membroj per leteroj al eksiĝintaj membroj, instigo al la sekcioj organizi kursojn ktp.;
2. iniciati kaj helpi en la fondo de novaj sekcioj;
3. helpi la malgrandajn kaj nefortajn sekciojn en ilia laboro;
4. plifortikigi la kontakton inter la ĉefestraro kaj la sekcioj per:
   a. ĉefestrara vizitado;
   b. regula informado al la sekcioj pri la ĉefestrara laboro;
   c. konsciigo de la sekciaj estraroj, ke iliaj tujaj pritrakto kaj respondo al la ĉefestraraj leteroj kaj petoj progresigas la efikan laboron de la asocio;
5. ordigi kaj kompletigi la asocian bibliotekon kaj ellabori la eblecon prunte transdoni ĝin en bona stato al publika librejo;
6. efike uzi la kartotekon de niaj membroj;

B Informa Fako:

1. esplori la eblecojn por pligrandigi la laboron de la Informa Fako;
2. se necesas, starigi samajn fakojn en la sekcioj;
3. interŝanĝi inter la sekcioj la spertojn kaj manierojn de la propaganda informado;
4. sekvi en ĉi ĉiuj punktoj la principaron de Frostavallen.

C Lingvo:

1. uzi ĉiam la Internacian Lingvon en kongresoj, kunvenoj ktp.;
2. zorgi, ke la lingvo en la publikigaĵoj de nia asocio estas senerare uzata;
3. instigi al la kompilado kaj presado de lernolibroj kaj vortaroj.

Ĉ Kongresoj:

1. organizi, minimume unufoje jare, kongreson, se eble en kunligo de najbaraj landoj;
2. organizi kaj instigi al partopreno en internaciaj aŭ naciaj seminarioj, diskutrondoj ktp.

D Publikigaĵoj kaj kulturaj agadoj:

1. daŭrigi la plibonigon de nia organo laŭ aspekto, amplekso, enhavo kaj lingva uzo;
2. instigi kaj helpi en la publikigo de „Nederlanda Antologio";
3. instigi al traduko de nia nacia literaturo, por ke ĝi fariĝu internacie konata;
4. instigi al la uzo de nia magnetofonservo;
5. instigi al la uzo de nia teatra servo;
6. organizi prelegvojaĝojn kaj helpi en tiuj, organizitaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj;
7. instigi, ke ĉiu grupo havu libro-servon en rilato kun la libro-servo de LEEN.

EKSTERAJ TASKOJ:

A U.E.A.:

1. kiel eble plej bone funkciigi la peradon por UEA en nia lando;
2. kunlabori en ĝiaj projektoj kaj helpi ĝin en la reciproka informado;
3. instigi la membrojn fariĝi individuaj membroj de UEA;
4. instigi la membrojn partopreni en la Universalaj Kongresoj.

B Nederlanda Centra Komitato Esperantista:

1. kunlabori en ĝia agado, nome gazetar-servo kun bulteno, radio-servo, kaj aliaj;
2. kunlabori en ĝia transformiĝo en Federacio de Nederlandaj Esperanto-organizaĵoj.

C „Esperanto ĉe la instruado":

1. kunlabori por efektivigi ĝian celon „Esperanto en la lernejo;
2. instigi niajn sekcio-membrojn kunlabori, kiam la institucio laboras en ilia regiono.

Ĉ Ekzamenkomitato:

1. per niaj delegitoj kunlabori kaj laŭ la ebleco plifortigi kontakton kun ĝi.
2. instigi niajn membrojn partopreni en la ekzamenoj, organizitaj de ĝi.

D Aliaj rondoj:

1. reprezentiĝi en aliaj organizaĵoj por disvastigi tie Esperanton kaj ĝian utilon;
2. instigi la sekciojn fari la samon en sia regiono.

ESPERANTO-LINGVOKVIZO.

Testu vian scion pri Esperanto:

1. *Kiu vorto ne harmonias en la serio: alaŭdo, skolopendro, solano, talpo?*
2. *En kiu landnomo oni povas anstataŭi Ĉ per Ĥ?*
3. *Ĉu „risorto" troviĝas en a. zoologia ĝardeno? b. brakhorloĝo? c. loko apud la marbordo, kiel feriloko?*
4. *La vorton „iri" oni povas elparoli ankaŭ de malantaŭe antaŭen. Nomu ankoraŭ 3 tiajn Esperanto-vortojn.*
5. *Ĉu „hejti" signifas: a. krii ‚Saluton'? b. varmigi ĉambron? c. nomo de insulo sude de Usono?*

* *
*

Respondoj al la antaŭa „Lingvokvizo" (N.E. jan.).

1. inkmakulo. 2. ambaŭ, ankoraŭ, anstataŭ, antaŭ, aŭ, baldaŭ, hieraŭ, hodiaŭ, kontraŭ, kvazaŭ, laŭ, morgaŭ, naŭ.
3. ajn, trajn-, ŝajn-, tajp-, kaj, najbar-, grajn-, pajl-, najl-, najtingal-.
4. a) Ĉiuj instruistaj salajroj estos plialtigitaj. b) Nur la tro malaltaj salajroj estos plialtigitaj.
5. nefrakcia nombro.

ESPERANTO EN LA RADIO.

POLA RADIO - GDANSK.

La 9-an de decembro 1963 la sendstacio de Pola Radio en Gdansk dissendis sian 130-an 15-minutan disaŭdigon pri Esperanto kaj en Esperanto, komencante per ĝi samtempe la 4-an jaron de E-dissendoj (de 8-XII-1960). La disaŭdigoj okazas ĉiulunde de la 7.15-7.30 matene laŭ nederlanda tempo sur la mezondoj 230 m (1303 kHz) en la normala programo. La Redakcio de la esperanta programo bezonas konstantajn informojn pri la vivo esperantista kaj gratulleterojn.
La adreso: POLA RADIO - GDANSK (Pollando).

RADIO PRAGO.

Radio Prago, disaŭdigo por Aŭstrio, regule envicigas Esperanto-elsendon ĉiun lastan ĵaudon en la monato. Tiun ĉi elsendon vi trovas sur mezondo 233,3 m (1286 kHz) de la 18.50-19.00-a horo. La programo por la unua kvaronjaro de 1964:

30.1.1964 „Kion ni atendas de la Novjaro 1964".
27.2.1964 „Julie Ŝupichová, multmerita pionirino de Esperanto-movado 80-jara".
26.3.1964 „Miloŭ Lukas: Miaj rememoroj pri Aŭstrio".
Aŭskultraportojn ŝatas ricevi Radio Prago, disaŭdigo por Aŭstrio, ESPERANTO - ELSENDO (Ĉeĥoslovakio).

PETU PROSPEKTON PRI

ĈE I.T.C. - GEB. 114
SCHIPHOL NEDERLAND

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia".

Prez.: S-ro H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 60, Utrecht.
Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.). Tel.: 0 25 60 - 76 15
Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25. Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.
Libroservo: Pythagorasstraat 122, Amsterdam-(O.). Poŝtĝirkonto: 7 69 15 Tel.: 0 20 - 5 13 79.

KONCIZE.

Adresŝanĝo: la adreso de C. E. K. I. T. (Centro por Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo) nun estas: Via Villoresi 38, MILANO, Italujo.

LA SUDA STELO reaperos. Kvankam multaj problemoj ankoraŭ ne estas solvitaj, oni povas esperi, ke komence de februaro 1964-a aperos la unua numero de „LA SUDA STELO" el la nova serio. Laŭenhave ĝi restos revuo socia, kultura, arta kaj primovada. Krome ĝi anstataŭos la organon „Jugoslavia Esperantisto". Ĝi aperos dumonate. Adreso: Jugoslavia Esperanto - Ligo, BEOGRAD, Terazije 42, Jugoslavio.

Ni ricevis: *Der Trichter - La Funelo,* Aktualaj Informoj pri la Internacia Lingvo Esperanto (3-a jaro, okt.-dec. 1963). Interesa germanlingva informilo pri Esperanto. Eld.: S-ro Ludwig Pickel, 8500 Nürnberg 2, Poŝtkesto 2113. Presita.

VIGLA ELDONADO DE ESPERANTO-LIBROJ EN VJETNAMIO.

Hanojo (IGS/571). - En Vjetnamio, kiel cetere en pluraj aliaj aziaj landoj, la interesiĝo pri la Internacia Lingvo Esperanto lastatempe tre grandiĝis. Bona ekzemplo de tio sendube estas la fakto, ke, krom oficiala ilustrita revuo („Vjetnamio antaŭenmarŝas"), estis en la jaro 1963 eldonitaj en tiu lando kvar novaj verkoj en la Internacia Lingvo, nome la romano „Senelirejo" de Nguyen Kong Hoan, la fantazia rakonto „La Aventuroj de Ze Men" de To Hai, „Elektitaj Poemoj" de To Huu kaj la romano „La Lasta Fortreso" de Huu Mai.

NOVA REVUO EN ESPERANTO.

Ekde la 1-a de januaro 1964 en Sofio (Bulgario) aperos nova, dumonata, 32-paĝa esperanta revuo „RIPOZOJ", presata sur tre luksa papero en kvar koloroj. Formato 22/31 cm. Ĝia enhavo ampleksos distran kaj belartan legaĵojn, artikolojn pri turismaj objektoj kaj somerrestadejoj, pri historiaj kaj kulturaj monumentoj, pri internaciaj sportaj eventoj k.a. Ĝi regule informos pri anoncitaj vizitoj de fremdlandaj esperantistoj al Bulgario kaj pri reciprokaj vizitoj inter bulgaraj kaj fremdaj esperantistoj.

Jara abono: 1,5 us. dol.

Sumojn sendu al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam / Nederlando aŭ al la Redakcio - bulv. Tolbuhin 51, Sofio/ Bulgario.

KORESPONDPETOJ.

Grzybek Tadeusz, Piersciec 221, p-ta Skoczów, pow, Cieszyn, woj. Katowice, Pollando, serĉas proks. 16-jaran korespondamikon en Nederlando.

Asen Doĉev, 31-jara elektro-teknikisto, adr. Pr. Grigoristr. 6, KOLAROVGRAD, Bulgarujo, dez. kor. Inter. pri filatelio. Li nepre partoprenos la 49-an U.K. en Hago.

Saŝka Al. Miteva, 13-jara lernantino, Geo Milev 7, VRACA, Bulgario, deziras kor. pri ĉiuj temoj.

S-ino Kvirina Szopinska Varsovio 33, ul. Saska 60/2 (mezaĝa) pri lingvoj, literaturo, muziko, filmo, turismo, bildkartoj.

S-ro Reinhold Lehmann, 65-jara arĥivisto, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: DRESDEN N6, Turnerweg 3, D.D.R. (Germana Popola Republiko).

KUL